

# SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

Maj 1947

35 årg. Nr 5

ORGAN FÖR SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

## IEL + UEA = nova UEA



La prezidanto de IEL, sro generalo Bastien (dekstre) kaj la prez. de la Sveda Esperanto-Federacio, sro Malmgren, parolas pri la nova, forta UEA.

Iu ŝercemulo klarigis, ke asocio signifas kolektaĵo de homoj, kie oni diskutas statutojn. Alia spritulo diris al mi iufoje, ke kiam iu asocio havas energiajn gvidantojn, tiuj ĉiam proponas novajn statutojn. Se tiu spritulo pravus, la esperanto-movado posedis kaj posedas amasojn da energiaj gvidantoj kaj aktivuloj. Ĉar verdire mi konas nenium ajn alian nacian aŭ internacian organizaĵon, kie oni tiel persiste kaj pasie diskutis statutojn kaj organizajn problemojn kiel inter la esperantistoj. Mi havas la percepton, ke dum multaj jaroj ni oferis 50 % aŭ pli de nia poresperantista laboro por la organiza disputado.

Karaj samideanoj, vi povas imagi al vi, ke sen tiu organiza diskuto, grandparte senfrukta, nia movado verŝajne estus nun havinta multe pli fortan pozicion. Cetere mi persone spertis, ke ĝenerale ne multe gravas pri la teksto de la statutoj, se nur la gvidaj demokrataj principoj estas respektataj: a) la decidoj devas esti farataj per voĉdonado de la voĉdonrajta instanco, kaj la malplimulto devas respekti la decidon de la plimulto. b) la ofichavantoj devas esti kontrolataj de elektitaj revizoroj kaj devas esti respondecaj antaŭ la

membroj, respektive antaŭ la komitato aŭ la deputitaro, kiu reprezentas la membraron. c) Kaj fine la membraro aŭ la komitato devas havi la rajton fiksi la ĝeneralan laborplanon por la koncernaj ofichavantoj.

I. E. L. fondiĝis en 1936 pro neakordiĝo kun svisaj UEA-gvidantoj. Mi ne volas detale ripeti la longan rakonton pri la kaŭzoj. Mi nur mallonge konstatas, ke I. E. L. jam de la komenco estis subtenata de preskaŭ ĉiu landa esperantista asocio, sed la malnova U. E. A. daŭrigis sian agadon, speciale en kelkaj landoj. El tio venis malfeliĉa duobleco de la neŭtrala esperantomovado, kiu fakte multe genis la laboron. La esperantistoj ne sentis sin kiel en unu komuna hejmo, sed kiel dispartigitaj familio. Tial la estraroj de I. E. L. kaj U. E. A. provis diversajn eblecojn kunfandi la du organizaĵojn.

En la lasta jaro tiuj penadoj estis tre fervoraj. Kaj dum la kunsidoj de la estraro de I. E. L. en Londono dum la pasko ni finfine subskribis kontrakton pri unueca organizaĵo. La rezultoj baldaŭ vidiĝos, ĉar jam ekde majo la internacia gazeto estos komuna por I. E. L. kaj U. E. A. Kaj la nunjara jarlibro, aperonta en majo, ankaŭ estos komuna. La estraro de I. E. L. pretigis proponon pri novaj statutoj por la nova asocio, kiu reprenos la nomon Universala Esperanto-Asocio. Laŭ la statuto la centra oficejo situos en Londono, gvidata de la ĝenerala sekretario. En Genevo estos oficejo por servoj, gvidata de honorofica administranto, kiu ankaŭ redaktos la gazeton. La komitato, elektita de la landaj asocioj kaj de la delegitoj, estos la plej supera instanco de la asocio. Ĝi fiksos la laborplanojn de la oficejoj kaj kontrolos pere de revizoroj la ekonomian agadon de ĉiuj fakoj kaj entreprenoj de la asocio.

La solvo nun atingita espereble kondukos al unueca tutmonda esperanto-laboro. Ni antaŭvidas trankvile la estontecon, kiu evidente alportos pacon inter la esperantistoj kaj akumuladon de la fortoj por ataki la indiferecon kaj la kontraŭstaron de la ĝenerala publiko. La perspektivoj por sukcesa laboro estas brilaj. Ĉar nun ni estas unuigitaj. Kaj unuigitaj ni venkos!

E. Malmgren

La Espero, Majo 1947.

## Ĉu enkonduki Esperanton en la esperantomovadon?

Ni antaŭ kelka tempo ricevis leteron, kiu tekstas jene:

"Tre estimata samideano!

Trastudante vian gazeton, mi trovis en la januara numero svedlingvan noton pri "Utbildningskurser i Esperanto för lärare". Ni interesigas pri la enhavo de ambaŭ, sed ni ne komprenas la svedan lingvon. Tial ni petas vin pri esperantlingvaj resumoj.

Via gazeto tre interasas nin, kaj ni ĉerpas el ĝi valorajn instigojn. Ni gratulas al vi pro via bonega redaktado!

Kun samideana saluto ni restas ĉiam je via dispono.

Dro Leopold Grimme."

La demando pri la enhavo de svedlingva artikolo metas nin antaŭ la problemo de la dulingveco de la "naciaj" esperantaj gazetoj. Kutime oni ja pravigas la nacian lingvon per tio, ke oni deziras, ke ankaŭ "la komencantoj komprenu". Sed ĉu tio estas vera? Ofte oni deziras, ke oni komprenu eksterlandan gazeton esperantan, sed ĝi aperas kvazaŭ sfinkso.

Sed ne tio, ke la komencantoj (eble eternaj komencantoj?) komprenu, sed la internacieco estas la esenco de esperanto. Kaj la plej multajn "esperantajn" gazetojn, kiuj aperas, ni ne komprenas! Ĉu ne estas tempo enkonduki esperanton en la esperantomovadon?

Oso.

## BERN-KONGRESSEN

Anmälningblanketter beställes hos SEF.

Anmälningavgift: 35 schw. francs. Beloppet beställes hos någon affärsbank, som ombesörjer översändandet till Volksbank, Bern, för kongressens räkning.

Hotell och mat: Beställning och betalning göres omedelbart enl. ovanstående. Kategorierna A: 2 och A: 3 fulltecknade.

Utflykter: Anmälningar göres snarast för att få plats.

Resan: Avresa från Malmö torsd. 24 juli kl. 6,30 fm. Ankomst till Bern fred. 25 juli kl. 20,55. De svenska deltagarna anländer alltså redan natten före kongressens början, varav följer en extrakostnad för logi och mat på 10—15 kr. Enligt nu föreliggande uppgifter kan återresa till Sverige inte ske lördagen den 2 aug. (då intet tåg avgår) utan först måndagen den 4 aug. Återkomsten till Malmö blir därför onsd. den 6 aug. kl. 10,30 fm. De som önska stanna kvar i Schweiz en vecka för att delta i någon rundresa torde meddela detta till RESO. F. ö. kan återresa ske även senare men i så fall bör RESO meddelas, att återresedag ej önskas fastställd. Vederbörande får då själv i Schweiz reservera plats för återresan genom någon resebyrå.

Obs! En internationell järnvägskongress pågår f. n. och av denna anledning reservera vi oss för event. ändringar i järnvägstider o. s. v.

Resekostnad: Malmö—Bern och retur i III-e klass 166: — kr. och i II-a klass 252: — kr. Sovplats i II-a klass kostar 72: — kr. pr natt.

Anmälan till gruppresan: Senast den 1 juli insändes till RESO, Stockholm, postgirokonto 151945, en anmälningavgift av 25: — kr. (som avdras vid biljettens slutbetalning) för deltagande i gruppresan. Anteckna

på girotalongen: "Anmäler mig till Esperantos kongressresa till Bern. Jag önskar få blanketter för att anhålla om behövt visum genom Tyskland. Jag ämnar anträda återfärden från Bern den 4 aug. (eller 11 aug.)".

Visum: Se ovan! RESO ordnar saken. Kostnad omkr. 5: — kr.

### PROGRAMO DE LA KONGRESAJ FAKKUNSIDOJ.

Lundo, la 28a de Julio.

- 14.30 Kooperativa Esperantista Ligo (Unua kunveno). Adreso: S-ro A. A. Ager, 8, Pelham Road, Beckenham, (Kent), Anglujo.  
Tutmonda Esperantista Jurnalista Asocio Adreso: LKK.  
Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) (Unua kunveno). Adreso: S-ro Ivar E. Karlsson, Box 877, Leksand, Svedujo.

Mardo, la 29a de Julio.

- 14.30 La Bar-rompantoj. Adreso: S-ro Pastro W. J. Downes, 7 Hill Street, Kingswood, Bristol, Anglujo.  
Internacia Asocio de Poŝtmark-Kolektantoj. Adreso: XPDO House, Didcot (Berks), Anglujo.  
14.30 Esperantistaj Rotarianoj (Lunĉo je la 12.15 ĉe la Bernaj Rotarianoj). Adreso: IEL, Heronsgate, Rickmansworth, (Herts), Anglujo.

Merkredo, la 30a de Julio.

- 9.00 I.L.E.P.T.T. La subasocio: Internacia Ligo de Esperantistaj Poŝt- kaj Telegrafocistoj (P.T.T.). Adreso: S-ro R. Filliatre, Achères, (Seine et Oise), Francujo.  
Movado Al Abundo (Unua kunveno). Adreso: S-ro E. E. Jelland, 14 Rue de la Republique, Marseilles, Francujo.  
Psika esploro kaj spiritismo. Adreso: S-ino Nora Holmes, 38, Fillebrook, Road, London, E, 11, Anglujo.  
14.00 Universala Ligo. Adreso: Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando. KELI (Dua kunveno).

Ĵaŭdo, la 31a de Julio.

- 9.00 I.L.E.P.T.T. La subasocio: Fervojistoj. Adreso: S-ro Emil Keiser, Hubacherweg 7, Liebefeld, Bern, Svislando.  
Oksford-grupo. Adreso: S-ro Derrick P. Faux, The Bungalow, New Drive, Painswick, (Glos), Anglujo.  
14.00 Bahaismo: Adreso: F-ino Etty Graefe, 6, Cours des Bastions, Genève, Svislando.  
14.00 Pacifistoj. Adreso: S-ro V. Verda, 14, Leopoldstreet, Leeds, 7, Anglujo.  
Blinduloj. Adreso: S-ro Theo Kutzli, Schibenackerstrasse 6, St. Gallen-Ost, Svislando.

Vendredo, la 1a de Augusto.

- 9.00 Movado Al Abundo (Dua kunveno). Policista Ligo. Adreso: S-ro Schwartz, 10, rue Engelhardt, Strasbourg, Mainau, Francujo.  
Kooperativa Esperantista Ligo (Dua kunveno).  
14.00 Denaska Esperantistaro. Adreso: S-ro J. Guillaume, 34 rue de Chabrol, Paris, Francujo.  
Piska esploro kaj spiritismo. (Dua kunveno).

Pro diversaj kaŭzoj ni bedaŭrinde ne povas doni la deziritan tempon al kelkaj asocioj.

Katolikoj. Tempo ankoraŭ ne fiksitita. Turnu vin al S-ro Pastro J. De Mæyer, Collège Sainte Gertrude, Vivelles, Belgujo.

## SEF, ESTRARA RAPORTO PRI LA JARO 1946

## ESTRARO

La estraro konsistis el: E. Malmgren prez., J. Strönne vicprez., S. W. Ahlm sekretario, L. Åberg vicsekr., B. Skantz kasisto, K. Wästfelt ĉefdelegito de IEL kaj la distriktaj prezidantoj. Anstataŭantoj estis Elisabet Olsson kaj K. E. Karlsson.

La prezidanto, sekretario kaj kasisto funkciis kiel Plenuma Komitato. La estraro resp. la P K havis 15 kunsidojn.

## MEMBRARO

SEF havas 1191 membrojn. Inter ili 973 apartenantaj al 49 grupoj. La membraro do kreskis 15 %. IEL havas en Svedujo 233 aktivajn membrojn.

## AMIKARO DE SEF

36 personoj aŭ grupoj en tiu membrokategorio pagis al SEF kotizon de 60 kr. Dank' al ilia ekonomia apogo la federacio povis daŭrigi la pasintjare komencitan plifortigon de la propagando por nia lingvo.

Kune kun Amikaro de Esperanto ĝi donis al la kaso 3045 kronojn.

## JARKUNVENO

La jarkunveno okazis en Uddevalla la 8—10 junio kun 156 partoprenantoj. Jan Strönne prezidis kun Oskar Svantesson ĉe la protokolo. Plej gravaj decidoj estis: La fondo de junulara sekcio kaj akcelado de la sekci-estigo inter instruistoj kaj KELI-anoj.

## KONTAKTO KUN LA MEMBROJ

La P K dissendis komunikojn al la kluboj kaj rektaj membroj, inter alie la jarraporton kaj matrikulon, kiu ampleksis la adresojn de la klubaj estraroj kaj rektaj membroj. Krome kalendaro pri gravaj datoj por la sveda movado estis dissendata al ĉiuj kluboj kaj rektaj membroj.

## KONTAKTO KUN IEL

Kune kun Sveda Laborista Esperanto Asocio SEF pretigis 50.000 petskribojn al UNO. Ĉiuj estis dissendataj al kluboj kaj individuaj membroj. Ĝis la jarfino revenis 16.512 subskribitaj.

La delegita reto ampleksis 54 delegitojn kaj 83 fak-kaj vic-delegitojn. Ĉefdelegito estis ing. Karl Wästfelt, Stockholm.

S-roj E. Malmgren kaj J. Stenström estis elektataj komitatanoj de IEL.

## KONTAKTO KUN NEESPERANTAJ ASOCIOJ

SEF estis kolektiva membro de la Asocio por Interpopola Kunlaboro kaj pretigis kune kun SLEA ekspozician materialon, kiun tiu pacasocio cirkuligas inter svedaj popolaltlernejoj kune kun simila materialo de aliaj ideaj asocioj.

## KORESPONDA CENTRO

de SEF estis translokigata al Köping, kie B. Joelsson transprenis la taskon prizorgi organizadon de la korespondado inter svedoj kaj eksterlandanoj. La uzado de la Centra helpo estis malpli granda ol ĉe ĝia komenco 1945, verŝajne kaŭzita de tio, ke la multaj eksterlandaj gazetoj nun estas pli facile haveblaj kaj kun ili la multaj korespondanoncoj.

## PRELEGVOJAGO DE JOSEF VITEK

Inter 20.2 kaj 2.6 1946 SEF aranĝis por s-ro Josef Vitek, Hrádec Králové, Ĉeĥoslovakujo, prelegvojaĝon tra tuta Svedlando, de Ystad ĝis Kiruna. Li parolis pri sia lando en paco kaj dum milito kaj montris lum-bildojn. Ĉie granda reklamo kaj bonaj gazetartikoloj. Entute li havis

53 publikajn paroladojn kun 3.910 aŭskultantoj	
16 klubajn " " 600 "	
21 lernejaĵajn " " 2.640 "	
Sume 90 prelegojn " kun 7.150 aŭskultantoj	

## ESPERANTO-SEMAJNO

Por la aŭtuna reklamo SEF presigis kaj distribuis pere de la klubo en Malmö 3.000 afiŝojn kaj 12.000 reklamfoliojn. 10.000 reklamkartoj por varbado inter skoltoj dissendataj per 3.000 al la jamboreo en Gränsö kaj per 7.000 (dissendataj de la Skövde-klubo) rekte al skoltaj grupoj en la tuta lando. Eldona Societo Esperanto kontribuis al la propagando per anoncoj en ABF:s tidning, Dagen, Freden, Frisinnad Ungdom, Sydöstra Sveriges Dagblad kaj Västernorrlands Allehanda. Krome la reklamfolio estis distribuata per adres-kaj program-kajero de bontemplana distrikto en Småland.

## ENSPEZIGA REKLAMO

30.000 alumetskatoloj pretigitaj kaj distribuataj pere de Klubo Esperantista de Malmö. Ĉe la jarfino la duono jam forvendita al kluboj kaj unuopuloj.

Loterio kun 10.000 lotoj po kr. 0.50 finvenditaj dum 3 tagoj en Stockholm. Neta gajno kr. 1.929:—

## SVEDA ESPERANTO INSTITUTO

La instituto ekzamenigis 5 personojn por la supera kaj 26 por la elementa ekzamenoj. Dum la somero okazis 2 kursoj, unu en Uddevalla sub la nomo Somero Universitato kaj alia en Jursla apud Norrköping. Ambaŭ kursoj estis plensukcesaj kaj vizitataj de kune 100 personoj. Radiodissendoj okazis speciale per mallongaj ondoj, entute 9 fojojn, kaj krom tio dissendo en la ordinara programo sub la punkto "Eĥo de la tago" okaze de la Somera universitato.

La instituto en la jaro 1947 povas festi sian 25-jaran jubileon, ĉar en 1922 fondiĝis la ekzamena komisiono de SEF, kiu poste akceptis la nomon Sveda Esperanto-Instituto.

## ELDONA SOCIETO ESPERANTO

ricevis novan gvidanton, Sune W. Ahlm, post la retiriĝo de Bernhard Eriksson. Ĝi eldonis la organon de SEF, Svenska Esperanto Tidningen La Espero, redaktata de s-ino Eva Julin, kiu eksigis ĉe la jarfino post 8½-jara sindona laboro. Oskar Svantesson fariĝis la nova redaktoro. La gazeto aperis per 11 numeroj kun entute 128 paĝoj, kio signifas, ke ĝi komencis rehavi sian antaŭmilitan amplekson kaj aspekton. La meza eldonnombro po monato estis ĉ. 2.000 ekz. La septembra numero aperis en 7.000 ekz.

Jenaj libroj estis eldonitaj: La ŝlosilo 15-a eldono kaj 191—200.000-a ekz., D. Flood: Mi serĉis oron, S. Engholm: Vivo Vokas, F. Szilagyi: Kvara Rapsodio, Bernadotte: La Fino (3-a eldono). La gajno de la vendado estis 820:— kr. Prizorgantoj de la eldonejo estis ĉefe S. Ahlm kaj K. E. Karlsson.

## HELPO AL EŬROPO

Al SEF estis senditaj 1.600 kr., kiu kune kun 300 kr. restantaj de 1945 estis uzataj por aĉeto de varoj sendotaj al Hungarujo, Aŭstrujo kaj Pollando. Ĉirkaŭ 4.000 kilogramoj da varoj dissenditaj pere de la helpkomitato, s-ino Anna Alamo, s-ino Carin Hägglund kaj s-ro E. Malmgren.

## FINVORTOJ

Nia jarraporto tre resume pritraktas la agadon de la federacio. Entute la jaro 1946 estis por nia afero sukcesa, kaj en Svedlando kaj eksterlande. Tial ni kun bona optimismo antaŭvidas la estontecon, kiam la esperantistoj en la tuta mondo denove povos restarigi firman kontakton per internaciaj kongresoj, kursoj, renkontiĝoj kaj vojaĝoj. Por la svedaj esperantistoj la venonta agadjaro estos tre signifoplena, ĉar ni ja portos la respondecon por la mondkongreso en 1948, kiu estos en Malmö.

Laŭstatute finiĝas la estrarmandatoj de la prezidanto E. Malmgren, la vicsekretario L. Åberg, la kasisto B. Skantz kaj la anstataŭanto K. E. Karlsson. S. W. Ahlm, kies mandato finiĝos post nun jaro, jam nun petas eksigon.

Ernfrid Malmgren Sune W. Ahlm Bengt Skantz  
Jan Strönne Lennart Åberg

## Ekonomia raporto pri 1946

Bilanco la 1.1. 1946.

B o n h a v o j :

Inventariaĵoj .....	1:—	
La filmo .....	1:—	
Valorpaperoj .....	4.770:—	
En la banko .....	2.945:49	
En la kaso: poŝtĉeke .....	2.009:57	
kontante .....	55:89	2.065:46
	<b>Kronoj</b>	<b>9.782:95</b>

ŝ u l d o j :

Diversaj kreditoroj .....	1.783:25	
Vojaĝkompensa fondaĵo .....	362:50	
Sindika fondaĵo .....	157:10	
Propaganda fondaĵo .....	4.894:21	
„ kaso .....	1.605:65	
Kapitalo .....	980:24	
	<b>Kronoj</b>	<b>9.782:95</b>

Konto de gajno kaj perdo la 31.12. 1946.

E n s p e z o j :

Kotizoj .....	5.907:35	
Gajno de la jarkunveno en Uddevalla .....	181:75	
Diversaj enspezoj .....	2.400:50	
	<b>Kronoj</b>	<b>8.489:60</b>

E l s p e z o j :

Repago de kotizoj .....	611:50	
Oficejaj kostoj .....	1.062:75	
Afranko .....	641:10	
Presajoj .....	1.773:—	
Sveda Esp. Gazeto .....	271:—	
Honorarioj .....	400:—	
Vojaĝkostoj .....	813:75	
Sveda Esp. Instituto .....	591:85	
Stipendioj .....	1.000:—	
Diversaj elspezoj .....	259:10	
Gajno 1946 .....	1.065:55	
	<b>Kronoj</b>	<b>8.489:60</b>

Bilanco la 31.12. 1946.

B o n h a v o j :

Inventariaĵoj .....	1:—	
La filmo .....	1:—	
Valorpaperoj .....	4.770:—	
En la banko .....	3.942:07	
En la kaso: poŝtĉeke .....	3.073:57	
kontante .....	7:36	3.080:93
Diversaj debitoroj .....	97:18	
	<b>Kronoj</b>	<b>11.892:18</b>

ŝ u l d o j :

Diversaj kreditoroj .....	2.350:85	
Vojaĝkompensa fondaĵo .....	570:—	
Sindika fondaĵo .....	175:81	
Propaganda fondaĵo .....	5.041:71	
„ kaso .....	1.708:02	
Kapitalo .....	2.045:79	
	<b>Kronoj</b>	<b>11.892:18</b>

### Alvoko al Svedaj geinstruistoj, gelernantoj kaj gestudentoj!

Ni deziras fari inter svedaj kaj hungaraj gelernantoj, gestudentoj kaj privatpersonoj kulturilaton per korespondado en germana, angla, franca, kaj esperanta lingvoj.

Ni petas korespondantojn. Donu la sekvantajn datojn: nomo (familia nomo per grandaj literoj), adreso, profesio (lernejo aŭ fakultato), aĝo, interesiĝo, lingvo de korespondado. Sendu leteron aŭ liston de adresoj al sro Kovács Gusztáv, Budapest VIII, Ullői-út 20, Hungarujo.

## S E I F Kolono

### 60.000 DEKLARATIONER

har tryckts i Sverige. Av dessa har inte fullt 20.000 återsänts till S. E. F. vederbörligen underskrivna. Det finns nu alltså 40.000 blanketter, som ligger oanvända. Vi ber enträget, att alla, som har sådana oanvända blanketter, återsänder dem till S. E. F., så vi inte nödgas trycka nya blanketter. Det är pappersbrist i landet, och dessutom är tryckerikostnaden mycket hög. Hjälpa oss därför med att återsända **samtliga** blanketter, naturligtvis helst underskrivna. Varje återsänd blankett är en direkt besparing för förbundet! Tack!

Enligt överenskommelse med IEL komma deklARATIONERNA att överlämnas först efter sommaren slut. Fortsätt alltså energiskt namninsamlingen.

Ĉiuj membroj de la sveda parlamento ricevis cirkuleron kune kun formularo por la deklario al Uno.

### 35 SVEDAJ PARLAMENTANOJ

Ĵam subskribis la Deklaracion al la Unuigitaj Nacioj pri Esperanto. Esperantistoj, ĉu ĉiuj viaj amikoj subskribis? Sed vi ankaŭ havas konatojn, kiujn vi kelkfoje renkontas. Ataku!

### INSTRUISTAJ KURSOJ.

Post aproboj en ĉiuj koncernaj instancoj la parlamento decidis asigni por esperantaj kursoj por instruistoj 5 000 kronojn. La kursoj okazos ĵam la nunjaran someron.

STATSUNDERSTÖDDA

## ESPERANTO-KURSER

i Stockholm 15—25 juli.

Parallellt ordnas 2 kurser för lärare, den ena enl. ĉe-metoden, den andra enl. szilagyi-metod. Lärare: dro F. Szilagyi och J. Rosbach.

Tillfälle att auskultera i parallellkursen.

Deltagare erhåller fri resa hemorten—Stockholm (ej retur) samt ett dagtraktamente av 7 kr. Inkvartering kan erhållas genom RESO, Sthlm. Anmälningar, senast den 1 juni, ställas till

**SVENSKA ESPERANTO-INSTITUTET,**  
Tegelbacken, Stockholm.

### ESPERANTO OCH STORPOLITIKEN.

”Det fins ingen fast punkt — inget Esperanto — för de fyra stora”, sa redaktör T. G. Wickbom i rapporten från London i ekot i radion den 25 april, då han omnämnde oenigheten vid fredskonferensen i Moskva och den därstädes rådande språkförbistringen.

Nänä, det finns nog inte det. Inte i vare sig det ena eller andra avseendet. Men vi esperantister måste undra, när de stora ska få så pass förnuft, att de åtminstone inför det tekniska hjälpmedel till förstående, som esperanto är.

# SVEDA KRONIKO

## KARLSKOGA.

Dimanĉe la 20-an de aprilo Karlskoga Esperanto-Societo La Aglo riĉiĝis je unika okazintaĵo, kiu forte impresis ĉiujn ĉeestantojn kaj kiu, se ĝi fariĝos tradicio, multe helpos al la societo kaj la movado firme konstrui sian daŭran vivon. Nome okazis la unua komuna, parte esperanta infanbapto en la bele kunfloroj kaj kandeloj ornamita societa ejo, aranĝita de la membroj de la societo. Ok infanoj, filinoj de esperantistoj, estis baptitaj.



Sur la bildo vi vidas de maldekstre s-inon Maria Forsman kun la filineto Yvonne, s-inon Elna Forsman kun la filineto Kerstin, s-inon Mimi Husberg kun la filineto Lil, s-inon Edith Härdig kun la filineto Marja kaj s-inon Karin Skagerstrand kun siaj tri filinetoj, starante la 3-jara Monica, sidante sur la planko la 8-jara Marianne kaj sur la genuoj Margareta, fine vi vidas s-inon Signe Axelsson kun la filineto Gudrun. Staranta malantaŭ estas la oficanto pastro Sigurd Bergström, la membro de la societo, al kiu ni estas dankemaj por la bela diservo kaj la bapto. S-ano E. Blanck tradukis la psalmojn kaj la mallongan predikon, s-ino A. Leijder ludis la orgenon. Post la bapta soleno la gepatroj de la infanoj gastigis ĉiujn ĉeestantojn per kafo. S-ano Arthur Axelsson esprimis la dankon al la oficanto kaj transdonis tablan esperantan standardon. Kelkaj junaj samideanoj el "La Aglidoj" brave kunhelpis, speciale la knabinoj, kiuj preparis la kafon kaj aranĝis la tablojn. Laŭdon al s-ano Ake Forsman, kiu prenis la iniciaton kaj al s-ano Karl Härdig, kiu efektivigis la tuton. Ĉeestis pli ol 40 personoj.

Redakcia sekcio de Kesla.

## HISHULT.

La klubo dum la unua kvaronjaro 1947 kunvenis kvarfoje. Dum la kunvenoj ni kantis, deklamis, prezentis dialogojn ktp. Nia studrondo, kiu estas aliĝinta al ABF, finis la studadon de de korespondkurso de Hermods. Poste ĝi legis kaj tradukis literaturon.

Nia jarkunveno okazis 24.3. Prezidanto-sekretario fariĝis Malte Markheden. Hugo Johansson vicprez. Anders Hanson kasisto.

## LINKÖPINGS ESPERANTOKLUBB

kunvenis 20/4 feste en la ABF-ejo. Ĉeestis ankaŭ 20-o da gesamideanoj de Norrköping, kiuj ekskursis aŭtobuse al Linköping. Dum la kunveno salutparolis la kluba prezidanto, s-ro Fred Turner, ĉefredaktoro Carl Hilmer Johanson faris esperantlingve paroladon pri "Esperantaj aktualaĵoj" kaj s-ro Nils Johansson donis sciigojn kaŭze de la venontaj junularaj tagoj en Jursla 12—15:an de Julio. Dum la kunveno oni montris kelkajn filmojn, servis kafon kaj aranĝis ludojn. Komuna kantado plibonigis la agrablan atmosferon de la bona kunestado.

C. Hilmer Johanson.

## LUNDS ESPERANTOKLUBB.

21. 1. S-ino Anna Alamo vizitis nian klubon kaj faris paroladon pri "Kun svedaj pakajoj al Eŭropaj landoj". La parolado okazis esperante, kaj s-ro Strönne funkciis kiel interpretanto.

3. 3. Jarkunveno. Agada kaj revizora raportoj estis aprobatataj. Estraro fariĝis: Sven Gullberg prez., Edvin Falck kas., Nils Persson sekr., Gust. Lidbjer vicprez., Sven Nilsson vicsekr. kaj Hans Petersson bibliotekisto.

## EKSJÖ ESPERANTOFÖRENING.

27. 3. Arsmöte. Styrelse: C. Ekström ordf., Robert Carlsson sekr., J. Lönn kass.

## "La Verda Stelo" ARVIKA.

5. 1. Ni invitis esperantistojn el Amotfors kaj Amål.

14. 2. Kunveno en la hejmo de s-ro Magnus Lindskog, kie ni pasigis agrablan vesperon diskutante la "facilecon" de Esp.

24. 2. Ferenc Szilágyi vizitis la metropolon de Jösse, kie li faris interesan paroladon pri sia hejmlando antaŭ la anoj de nia grupo. Plena kontentigo ĉe la auskultantoj...

20. 3. Sukcesa letervespero al kiu alvenis tre granda nombro da salutoj el 14 landoj.

La "Familio" iom kreskis per la aliĝo de 4 novaj anoj!

## SKANIA DISTRIKTO DE SEF

jarkunsidis la 23an de marto en Ystad. Reprezentantoj por la diversaj kluboj en Skanio ĉeestis. La jarraporto kaj la reviziista raporto estis aprobatataj, kaj la nova estraro aspektas jene:

Prezidanto: Jan Strönne, Malmö.

V. prez: Birger Johnsson, Kristianstad, sekr. Frans Rasmusson, Malmö, v. sekr. Gust. Lidbjer, Lund, kasisto Olof Glemminger, Malmö, kaj krome Einar Lemke, Hälsingborg, Britta Adolfsson, Hälsingborg. Anstataŭantoj: Klara Walldén, Ystad, Bernh. Melin, Eslöv, Nils Persson, Lund, kaj Karla Jönsson, Ystad.

Reviziistoj: Hilbert Hansson kaj Hildur Wallin, ambaŭ el Malmö kun Edvin Larsson, Arlöv, kaj Stina Persson, Malmö, kiel anstataŭantoj.

Distrikta studgvidanto iĝis Jan Strönne, Malmö, kaj komitatanoj por la preparo de elektoj 1948 iĝis Gösta Henriksson, Malmö, Thure Wendt, Hälsingborg, kaj Sven Gullberg, Lund.

La jarkunsido decidis okazigi la ĉi-jaran sved-danan esperantotagon en Hälsingborg, kaj estos aranĝata monkollektado por ebligi la viziton de la danoj. Krome la jarkunsido diskutis prelegvojaĝojn en Skanio aŭtune 1947 kaj transdonis al la estraro la taskon aranĝi la ĉi-jaran distriktan programon kaj energie verki por novaj kluboj en la distrikto uzante la propagandan valoron, kiun havas jam nun la okazonta universala kongreso 1948.

La jarkunsido decidis okazigi la venontjaran jarkunsidon en Klippan.

Post la kunsido sekvis vizito en la urbo kaj agrabla kunestado.

P—into.

**ROMO EN MARTO**

De nia speciala korespondanto (oni ja sin tiel esprimas en pli gravaj ĵurnaloj, ĉu ne?) en Romo ni ricevis ĉi suban leteron pri la vivo en la Eterna urbo.

Fine mi do estas en Romo, la postmilita Romo. Difektita? Ne, la ruinoj de la urbo vere havas pli antikvan daton ol tiu ĉi milito. Oni ne povas rimarki pli ol unu difekton de la lastaj jaroj: la centran stacidomon bombo trafis kaj parte detruis tiel, ke oni devis fari novan elirejon je la flanko de la domo, Sed cetere ĉio, tre feliĉe, estas savita el la milita furiozo. Tiuj monumentoj kaj konstruaĵoj, kiuj faris Romon fame konata tra la tuta mondo, ĉiuj restas. Se oni volas vidi la postsignojn de la milito, oni devas sin turni al alia kampo. Rilate al la vivstandardo de la popolo la milito signifis halton kaj malprogreson. La krizo portis kun si, tie ĉi same kiel en ĉiuj aliaj ŝtatoj, mankon je manĝaĵoj. Kaj poste venis la inflacio kun ega forto, revolucie ŝanĝante la vivkondiĉojn. Kaj, bedaŭrinde, la kriza tempo ne estas pasinta; ĝi ankoraŭ daŭras en multaj rilatoj. La "liro" itala rapide malplivalorigis dum la pasintaj jaroj. Nun la prezoj ree estas fiksjaj, sed la salajroj altiĝis ne sufiĉe rapide kompare al la devalorigo de l'mono. Konsekvence malriĉeco kaj malhavo troviĝas en grandaj tavoloj populaj. La liro nun, oficiale, respondas al ĉirkaŭ 3 oeroj svedaj (antaŭ la milito ĉ. 30 oeroj). La centesimoj, 1/100 de la liro, tute malaperis kaŭze de la inflacio, kaj nuntempe oni ne uzas monerojn, nur paperajn biletojn. La suspekto pri falseco de la biletoj ĉie regas; ofte la komercantoj antaŭ si havas lampeton, je kies lumo ili esploras la biletojn. La porciigado de manĝaĵoj nur en kelkaj kazoj estas severa, kiel ekz. pri sukero kaj lakto. En la restoracioj oni ne uzas manĝokuponojn. Entute multaj varoj abundas — la neebleco aĉeti ilin nur dependas de la tro alta prezo. Kaj krom la oficiala merkato troviĝas la ĉiopovaj kaj ĉiohavaj homoj de la nigra borso, kiuj ofte surprizige senĝene praktikas sian agadon. La militprofitintoj — klaso nekonata en Svedujo dum la dua mondmilito — estas ofte videblaj en la nuna Romo. Estas ili, kiuj plenigas la plej bonajn restoraciojn kaj posedas la plej elegantajn aŭtomobilojn. Certe la aŭtoritatoj batalas kontraŭ la nigra borso sed tamen ne rimarkinde sukcesas. Ĝi ekzistas ĉie — kaj nenie.

Sed la milito forpasis, kaj tio estas la ĉefa afero, konstatas la italoj. La vivo estu kiel ajn malfacila nun — pli malfacile estis senti la premegon de la milito. Unuanime oni tamen protestas kontraŭ la packondiĉoj: la gazetoj, kiuj pro manko de papero nur havas du aŭ kvar paĝojn, dediĉas grandan parton de la spaco al tiu temo.

Multaj anglaj kaj amerikaj militistoj ankoraŭ troviĝas tie ĉi. Tie kaj tie oni vidas la aliancajn flagojn, kaj la amerikanoj estas konataj ĉefe pro siaj "jeeps", kiuj kun grandega rapideco trakuras la metropolon en ĉiuj direktoj.

La trafika bruo surprizas personon, kiu venas el niaj silentaj urboj. Oni diras, ke la aŭtomobila signalado estis malpermesata dum la faŝista reĝimo, kaj ke la romanoj nun "venĝas". La ŝoforoj ŝajnas tre kuraĝaj — ili sendube eluzas sian lertecon pli komplete ol la niaj — kaj estas tre surpriziga la malalta nombro de akcidentoj. Alia trafika problemo estas la mallargaj trotuaroj, kiuj devigas multajn piedirantojn eliri en la straton, kie ili estas atakataj kaj minacataj de ĉiuspecaj veturiloj. Romo certe ne estas urbo por personoj kun malfortaj nervoj!

En la centro mem de la ĉefurbo oni abolis la tramojn kaj anstataŭigis ilin per aŭtobusoj kaj elektraj busoj. Tamen la tramoj travivis revalorigon dum la milito, ĉar ilin ne trafis la manko de benzino kaj kaŭĉuko. Ankoraŭ ĉiuj buslinioj ne funkcias, sed preskaŭ ĉiu-

semajne kreskas la linia reto. Tamen, se vi volas uzi tramon, ne provu porti pakaĵon kun vi! La enirpordo de la vagonoj estas malantaŭe, la elirejo antaŭe, kaj la konstanta interpuŝado daŭras de la unua pordo ĝis la alia. Ofte homoj pendas ekster la vagonoj kiel svarmantaj abeloj. Ankaŭ sur la kunligiloj inter du vagonoj mi vidis homojn veturantajn. Jen la kaŭzo, pro kiu ĉiuj tramvoĵistoj romaj havas tiel rezignan aspekton?

En plej bela harmonio kun la trafika bruo estas la krioj de la stratvendistoj. Ĉion oni vendas aŭ volas vendi surstrate: vestojn, pinglojn, librojn, kaŭĉukajn tubojn por aŭtoj. Eble la stratoj tiumaniere fariĝas pli malpuraj ol niaj, sed sendube ankaŭ pli pitoreskaj kaj pli intimaj. Tie ĉi oni povas studi la italan popolkarakteron, de ĝia plej suna gajeco ĝis la plej akra vortbatalo.

La ĉefa eco de la itala popolo rilate al gastoj fremdlandaj ŝajnas esti la afableco. Malgraŭ la malfacilaj kaj pezaj suferoj de la pasintaj jaroj la popolo de Italujo konservis sian amikecan humoron. Eksterlandano tion multfoje rimarkas, speciale kiam li provokas la paciencon de la indigenoj, malbone parolante aŭ miskomprenante ilian lingvon. Ĉar la lingva problemo ĉiam montriĝas — kaj estos tiel, ĝis oni universale akceptos esperanton. La anglan oni parolas tie ĉi multloke sed malmulte, kaj kun speciala itala prononco. Italujo estas bona ekzemplo pri la neebleco fari la anglan ĝenerale akceptita — la stranga angla elparolo ne taŭgas por ĉiuj, nur kreas novajn malfacilaĵojn. La germana lingvo estas uzata tre, tre malofte, la franca iom pli ofte. Sed por turisto, kiu ne volas ĉiam uzi la plej multekostajn hotelojn kaj restoraciojn, restas nur nun ebleco: iom lerni la italan. Se li havas tiun intencon, esperanto estas por li bona helpo kaj per sia vortaro kaj per sia klara sonaro. La italoj mem konsideras sian lingvon kiel "la sesan mondlingvon" (post la angla, franca, germana, hispana kaj rusa). Konata fakto ja estas, ke de Gasperi antaŭ la Unuiĝintaj Nacioj parolis itale kaj ne uzis iun el la 5 oficialaj lingvoj, kaj italaj sciencistoj ĉiam publikigas siajn verkojn en sia propra lingvo.

Pluvis multe en Romo dum tiu ĉi sezono, kaj la flava Tibero konsekvence altiĝis. Tamen estas agrablege por nordlandano travivi la mallongan sed belegan roman printempon. Jam en februaro, kiam hejme la severa vintro ankoraŭ regis, floris la mimozo kaj trilis la alaŭdoj. Kaj nun la suno preskaŭ konstante brilas super Romo, kiu en tiu lumo ellogas siajn plej belajn kolorojn: la blankon de la monumentoj marmoraj, la bluan de la ĉielo, la verdon de la parkoj, la flavon de la rivero, la multkolorcon de la sennombraj floroj. Nur tiel iluminita Romo montras al ni sian veran animon: ĉarma urbo en ĉarma lando.

P y r g o s.

**- MĀNADENS BOKTIPS -****FUNDAMENTA****KRESTOMATIO**

åter inkommen från Paris.

472 sidor.

Kr. 5:—

(10 % porto tillkommer)

**FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO**  
Fack 19071 Stockholm Postgiro 578

# KATALOG B UTLÄNDSKA esperantoböcker

Ur denna katalog, som beräknas utkomma till hösten, ha vi här gjort en sammanställning av det mesta, som nu finnes att få eller som kan anskaffas från utländska förlag. Med publicerandet av denna prislista annulleras alla föregående. Kompletteringar komma att annonseras i följande nummer av Svenska Esperanto Tidningen.

Amo en la jaro 10.000, La, J. Elola	hft. 4:—	inb. 5:—
Anni kaj Montmartre, R. Schwartz	hft. 2: 25	
Anstataŭa Edzino, E. Maxwell	inb. 4: 50	
Arthistorio, Hekler-Kalocsay	hft. 12:—	
Aventuroj de Marteno Drake, Norway	inb. 5:—	
Bela historio de Josefo, La,	hft. 1: 25	
Belga Antologio, 2 delar	hft. 9: 50	
Biblio	inb. 8:—	
Botistoj, La, Aleksis Kivi	hft. 1: 50	
Colomba, Prosper Mérimée	hft. 2:—	
Ĉu vi scias? 200 frågor och svar	hft. 1:—	
Diverskolora Bukedeto (Poem från 40 länder)	hft. 2:—	
Dormanto vekigas, La, H. G. Wells	inb. 5:—	
D-ro Dorner, H. L. Egerrup	hft. 6: 50	
El la nebulo, Ch. Hougaard	hft. 1:—	
Esperanta Literaturo, La, de Waard	hft. 2:—	
Esperanto Modelo (Krestomatlo)	hft. 2:—	
Esperanto por Infanoj, G. Solomon	hft. 2:—	
Fabeloj de Andersen, Del 2	hft. 2: 25	
— „ — Del 3	hft. 2: 25	
Fabiola, Kardinalo Wieseman	hft. 4: 75	
Fanny, Edna Ferber	inb. 5:—	
Forto de l' Vero, La, Adi	hft. 2: 50	
Fundamenta Krestomatlo, Zamenhof	hft. 5:—	
Gaja Knabo, Bj. Björnson	hft. 2:—	
Gaja Leganto, P. E. Schwerin	hft. 1: 25	
George Dandin, Molière	hft. 1:—	
Hamleto, Shakespeare	hft. 1: 50	
H. C. Andersen, Bibliografi, Heilskov	hft. 2:—	
Historio de Esperanto, Brüggeman	hft. 0: 40	
Historio kaj Organizo, Isbrücker	hft. 2:—	
Homoj sur flosglacio, 3-aktskomedi	inb. 2:—	
Jarmiloj pasas, Haefker	inb. 13: 50	
Jolanto, Henriko Hertz	hft. 1:—	
Johano kaj Silvio, F. F. Betts	hft. 1: 25	
Josef Pilsudski, Biografi	hft. 1:—	
Juneco kaj Amo, E. S. Payson	hft. 1:—	
Kiel eduki niajn infanojn, Ferriere	hft. 1: 25	
Knaboj de Paŭlo-Strato, La, F. Molnár	hft. 2:—	
Knock aŭ La triumfo de la Medecino, J. Romain	hft. 1: 25	
Kompatinda Klem, J. Merchant	hft. 1: 50	
Landoj de l' Fantazio, T. Jung	inb. 4: 25	
Libro de la Spiritoj, La	hft. 10:—	inb. 12:—
Londonanidoj, D. W. Munns	hft. 2: 75	
Longa Vojo, La, Richard Meye	hft. 2: 75	inb. 3: 75
Majstronoveloj, Th. Storm	inb. 3: 50	
